

Abunda fonto

**Memorlibro omaĝe al
Prof. István Szerdahelyi**

Redaktis Ilona Koutny

ProDruk & Steleto
Poznań, 2009

Pentraĵoj en la libro: János PRUNKL
Kovrilo: *Fontoj*
Rememoro: *Madono de Kereĉend*
Lingvoplanado kaj lingvopolitiko: *Ĉe barilo*
Lingvistiko de Esperanto: *Vintra princino*
Lingvopedagogio: *Vinberkolektado*
Literaturo: *Gardeno*
Esperanta leksikografio kaj ceteraĵoj: *Danubkurbiĝo*
Plano kaj teknika redaktado: Ilona KOUTNY

© Teksto: redaktinto kaj kontribuantoj
Pentraĵoj: János Prunkl

ISBN 978-83-61607-32-8

Wydawnictwo i Drukarnia – Eldonejo kaj Presejo:
ProDruk, ul. Błażeja 3, Poznań, Polska

Enhavo

Antaŭparolo	5
-------------------	---

Prezento kaj rememoroj

GADOS Zuzsa: Mallonga biografio	9
VAHA, Blazio: Mi sentas min lia instruito	16
HORVÁTH Jozefo: Kristnasko de 1981 ĉe profesoro Szerdahelyi	17
ERTL István: La malpravo de profesoro Szerdahelyi	19
HUKAYA Sitosi: Aventuro de japana junuleto kun Tamiko kaj Prof. Szerdahelyi	20
PRUNKL Mária kaj János: Rememoro vorte kaj bilde	24
FARKAS TATÁR Éva: "Ŝi estas pedagogo sendiploma"	26
ZAJDMAN, Jefim: Rememoro pri renkontiĝo en Moskvo	27
NANOVFSZKY György: Rememoro de diplomato	28
ROKICKI, Ryszard: Esperantologia testamento	29
DAHLENBURG, Till: Prof. Szerdahelyi – mia lasta renkontiĝo kun li	29
SILFER, Giorgio: La lingvistika redaktoro de <i>Literatura Foiro</i>	30
TÖTÖSNÉ GADOS Zuzsa – MÁTHÉ Árpád: Speciala bibliografio de esperanto-agado de István Szerdahelyi	36

Lingvoplanado kaj lingvopolitiko

BARANDOVSKÁ-FRANK, Věra: Praesperanto – la planlingva Ossian	65
SAKAGUCHI, Alicja: Nekonata planlingvo el Pollando: Paraglot	77
SCHILLER Judit: Akcepto de Esperanto (kaj de la mondlingvo-problemo) en la hungara (lingvistika) gazetaro, ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo 19a/20a	86
WACHA Balázs / VAHA, Blazio: Vortokategorioj en lingvopriskribo, en planlingvoj kaj lingvoprojektoj	101
BLANKE, Detlev: (Tro) malfrua vekiĝo? La germanoj kun sia lingvo en la Eŭropa Unio	123
GADOS László: Pri la ŝancoj de Esperanto en la mondo	143

De esperanta gramatiko al ĝenerala lingvistiko

DASGUPTA, Probal: Apud la vorteroj: la vortila kromvojo	159
DUC GONINAZ, Michel: Szerdahelyi kaj la "gramatika karaktero de la radikoj"	166
ROKICKI, Ryszard: Sintaksa genro de esperantaj radikoj	178
BUJDOSÓ Iván: Morfemkombinaĵoj en Esperanto	183
SIMONNET, Francisko: La skriberoj de Esperanto	189
HORVÁTH Katalin: Polisemio, sinonimio kaj esperanto	201
PENNACCHIETTI, Fabrizio A.: La 'cerbo' de la ostoj kaj la 'medolo' de la kapo	209
SALGA Attila: Skizo de kontrasta Esperanta-Hungara gramatiko	214
WASEDA Mika: Esprimo de moviĝo en Esperanto, la hungara kaj japana lingvoj	222
HAVAS Ferenc: Metaproblemoj de lingvotipologio	228
KUZNECOV, Sergej: Babelo – turo inter civilizoj	234

Lingvopedagogio

BARCSAY Zsuzsa: Kultura fono de Esperanto en diversaj lernolibroj por junuloj kaj plenaĝuloj	247
CORSETTI, Renato: La lernofaciliga valoro de Esperanto: de Szerdahelyi al <i>Springboard to languages</i>	256
KOVÁCS Márta: Antaŭ kaj post la Komuna Eŭropa Referenckadro: lingvaj ekzamenoj pri Esperanto	266
KÓRÓDY Zsófia: Instrui kvalite, kvalifikite	284
KOVÁTS Katalin: Moderna aliro al malnovaj ideoj kaj rezultoj	288
GACOND, Claude: Pri la personaj pronomoj. Metodikaj klarigoj	294
HORVÁTH Jozefo (Budapeŝto): Kio estas Pirata Metodo?	304
SALOMON CSÍSZÁR Pálma: Duboj kaj demandoj pri familia lingvouzo	312

Literaturo

TÓFALVY Éva: Aersoifo	323
SZABÓ Imre: Pensoj pri <i>Purakore</i> de Attila József	329
ERTL István: Pontoj inter la gentoj: Disaj pensoj pri Esperanto kaj tradukado	335
RÁTKAI Árpád: Frigyes Karinthy la esperantisto	340

Esperantaj leksikografio, movado kaj la cetero

HAUPENTHAL, Reinhard: Kio estas kaj kial ni bezonas Historian Vortaron de Esperanto (kun konkordanco de inkunablo 14: La Neĝa Blovado).	351
HORVATH, Jozefo (Győr): Esperanta-Hungara Meza Vortaro elektronika (EHV)	365
RÉVÉSZ Sándor: Ĉiuj aliel samas	374
DUDICH Endre: De mistero al mis-Tero	379
FERENCZY Imre: Historio de la Internaciaj Medicinistaj E-Konferencoj Hungaroj en la movado	385
MOLNÁR Lajos & FARKAS Julianna: Kvardek jaroj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo	391
HEGYI István: Provado per desegno-lingvo ĉe afazia knabo	397
KOUTNY Ilona: Esperanta leksikografio en la epoko de komputiloj	402

La ‘cerbo’ de la ostoj kaj la ‘medolo’ de la kapo

1. En mallonga letero, kiun L. L. Zamenhof sendis ĉirkaŭ la jaroj 1903-1904 al prof. Théophile Cart en Parizon koncerne la tradukon de ties *Premières Leçons* en la anglan, germanan kaj italan lingvojn por la eldonejo Hachette, aperas fine la jena frazo: «Mi pensas, ke la esprimoj *spina cerbo* kaj *ostocerbo* estas tute sufiĉaj kaj precizaj, kaj mi ne konsilus senbezone uzi novajn vortojn; tamen se iu uzos *medolo* mi ne protestos»⁶.

El tiu senkonteksta aserto oni eltiras, ke por Zamenhof la vorto *cerbo* havis vastan signifokampon, tian, ke ĝi kovris ne nur la koncepton ‘encefalo’ kaj ties figurajn sencojn konforme al la nuntempa Esperanto (NPIV 2002:189, 287-288), sed ankaŭ la konceptojn ‘mjelo’ (NPIV 2002:749) kaj ‘medolo’ (NPIV 2002:721-722). Tiel ĝeneralan sencon la etimo de *cerbo*, nome la latina vorto *cerebrum* kaj ties diminutivo *cerebellum*, kiel konate, ne havas. Tiuj vortoj devenas de la hindeŭropa radiko **keres-/keras-* signifinta “kapon” (kp. sanskrite *çiraḥ*, gen./abl. *çir-ṣnāḥ*, greke *kára* “kapo”), kaj metonimie (de entenanto al entenato) ili alprenis, kiel en kelkaj aliaj lingvoj, la signifon “encefalo”⁷.

Aliflanke, same larĝan signifogamon prezentas neniue el la parencaj vortoj de la latinidaj lingvoj⁸. Oni tiel inklinas konjekti, ke Zamenhof atribuis al la latina etimo kromsignifojn al ĝi fremdajn, inspirite de semantika modelo rimarkinde malsama ol tiu komuna al la latinidaj lingvoj.

2. La bazo de ĉiu lingvo estas ja ĝia konceptara sistemo kaj tiu sistemo estas eĉ pli fundamenta ol la koncernaj fonologio, morfologio kaj sintakso. Evidentiĝas do, ke, ankaŭ en la kampo de la koncepta segmentado rilata al la mola kaj pulpeca substanco entenata en la ostaj kavaĵoj, la unuopaj lingvoj kondukas diversmaniere.

Estas lingvoj, kiuj posedas ĝeneralan vorton, kapablan indiki ĉiuspecan entenaĵon de la ostoj, laŭbezzone per la kroma helpo de adjektivoj aŭ aliaj kvalifikiloj. Tia estas ekzemple la kazo de la hungara lingvo, kie *cerbo* diriĝas *agyvelő*, nome “kapmedolo”⁹. Kaj ankaŭ la kazo de la greka lingvo, kie origine *enképhalos* “encefalo” estis priskriba adjektivo de *muelós* “medolo”: *ho enképhalos muelós* “la enkapa (*en* + *kephalē*) medolo”.

⁶ Vd. *Originala Verkaro*, p. 530, letero n-ro 229; *Lingvaj Respondoj*, p. 23, n-ro 38.

⁷ Kp. malnovislande *hiarni*, svede *hjärn*, germane *Hirn* “cerbo”, de **keras-n-iyō-*, vd. Ernout-Meillet 1959:114-115.

⁸ Kp. portugale *cérebro*, hispane *cerebro*, katalune *cervell*, france *cerveau*, province *cervel*, itale *cervello*, suditale *cerevello*, sarde logud. *carveddu*, dalmate velj. *carviale*, vd. Battisti-Alessio 1968:874.

⁹ Laŭ *A Magyar Nyelv Történeti-Etimológiai Szótára*, vol. I: 105-106, *agy*, kiu jam sola signifas “cerbon”, estas sinonimo de *fej* “kapo” kaj de *koponya* “kranio”. Kp. *gerincvelő* “spinomedolo, mjelo” kaj *csontvelő* “ostomedolo”.

Estas aliaj lingvoj, kiel la latina, la latinidaj kaj la ĝermanaj, kiuj distingas per du apartaj vortoj, unuflanke la entenaĵon de la kranio, aliflanke la entenaĵon de la spino kaj de la ceteraj ostoj: ‘cerbo’ disde ‘medolo’.

Estas fine lingvoj, kiuj disponas ĉi-koncerne pri tre specifaj vortoj, tamen ne destinitaj al la ĉiutaga uzo, kiuj permesas distingi la entenaĵon de la vertebro disde tiu de alispecaj ostoj. En la okcidenta medicina terminologio oni tion faras atribuante al la prunteprenita greka vorto *muelós* “medolo” la specialigitan signifon de ‘mjelo’ (= ‘spina medolo’, aŭ laŭ Zamenhof ‘spina cerbo’).

Esperanto, almenaŭ en siaj debutaj jaroj, lokiĝis certe inter la lingvoj unue menciitaj kaj estus nun interese spuri la lingvan modelon, kiun Zamenhof havis antaŭ si, kiam li decidis kovri per la vorto *cerbo* la diversajn kvankam parencajn konceptojn ‘encefalo’, ‘medolo’ kaj ‘mjelo’. Nu, tiu modelo estas facile trovebla en la rusa, la hejmlingvo de Zamenhof¹⁰. Tie fakte troviĝas unu vorto *mozg*, kiu samkiel en arkaika Esperanto entenas la signifojn 1. “cerbo, encefalo” (*golovnoj mozg* “kapa cerbo”), 2. “medolo” (*kostnyj mozg* “osta cerbo”), kaj 3. “mjelo” (*spinnoj mozg* “spina cerbo”). Ĉi-rilate la ceteraj slavaj lingvoj, krom la ukraina kaj la bulgara, estas pli precizemaj. La pola ekzemple distingas *mózg* “cerbo, encefalo” disde *szpik* “medolo” kaj *rdzeń kręgowy* “mjelo”¹¹. Simile la ĉeĥa apartigas *mozek* “cerbo, encefalo” disde *stržeň* aŭ *tuk* (“graso”) *v kostech* “medolo”, kaj la serba distingas *mozak* “cerbo, encefalo” disde *moždina* “medolo”¹².

3. Kie male la distingo ne estas sufiĉe klara estas en la jida, judgermana lingvo, kiun Zamenhof lernis kiel infano de sia patrino, parolis kun siaj klientoj kaj eĉ science pristudis¹³. En tiu lingvo, malgraŭ en kelkaj ĝiaj dialektoj, kiel tiu de Litovio, oni emas distingi laŭ la germana modelo la cerbon disde la medolo, uzante por la unua la hebredevenan vorton *moyakh* (hebree *moaħ*) aŭ *gehirn* (germane *Gehirn*), kaj por la dua la vorton *markh* (germane *Mark*), tiu-ĉi lasta vorto kutime ampleksas ankaŭ la signifon “cerbo, encefalo”. Ekzemple Fineman tradukas la vorton *cerbo* per *markh* kaj *gehirn* (Fineman 1966:20) kaj la vorton *medolo* per la klarigo *dos veykhe fete shtof in beyner un in markh* “la mola grasa substanco en ostoj kaj en cerbo” (s.l.:80). Aliloke la sama aŭtoro tradukas *markh* per *cerbaĵo* (s.l.:164), cetere *mjelo* estas tradukita *di teyl fun nervn sistem vos holt dem rukn* “la parto de la nervosistemo, kiun entenas la spino” (s.l.:83).

La malspecifeco de la jida vorto *markh* ne klariĝas nur per la influo de la rusa modelo (vd. ruse *mozg*), ĉar same malspecifa estas la hebrea vorto *moaħ*, de kiu venas la jam menciita jida vorto *moyakh*. En la Bliblio *moaħ* aperas nur unu fojon kaj tio en *Ijob* 21,24 kun la signifo “medolo”. En la postbiblia hebrea lingvo *moaħ* signifas kutime kaj “medolon kaj “cerbon” (kun aŭ sen la specifigo *ro’š* “de la kapo”) kaj alprenas kelkiam eĉ la signifon “kapo”¹⁴. La sama vorto, skribita *mħ*, aperas en la kojnoformaj alfabetaj tabeloj de Ugarit (siria marbordo, 14-a jc a.K.) kun la du

¹⁰ Vd. Holzhaus 1969:70.

¹¹ Vd. Meisels 1964:187, 565.

¹² Vd. von Miklosich 1885:346.

¹³ Vd. Holzhaus 1969:19-34.

¹⁴ Vd. Jastrow 1926:740.

signifoj de “medolo” kaj “cerbo”, ekz.: *mĥ rišk* “la cerbo de via kapo”¹⁵. En la novhebrea lingvo *moaĥ* signifas plie “linfon, plantosukon”¹⁶; ĉiukaze hodiaŭ, flanke de *moaĥ* “cerbo, encefalo”, ekzistas *moaĥ ‘ašamôt* “medolo, cerbo de ostoj” kaj *moaĥ ha-šidra* “mjelo, cerbo de la spino”, ĝuste kiel en frua Esperanto.

Eĉ pli malspecifa estas la aramea siria vorto *muĥa* “cerbo; medolo; ovoblanko; grasajo (de la lando: *Genezo* 45,18); esenco; kranio”¹⁷. Simile la aramea mandea *muha*¹⁸ kaj ankaŭ la araba *muĥĥ* “medolo; cerbo; esenco” (krome, rilatate al okulo ĝi signifas “okulbulbon”: *muĥĥ al-‘ayn*). En la akada (asira-babilona) lingvo la vorto *muĥĥu(m)* specialiĝis male por “kapo, kranio” kaj figure por “supro, la supra parto”¹⁹. En tiu-ĉi lasta lingvo malaperis do ĉiu semantika ligo kun la origina signifo de la radikoj *Mĥĥ* “esti mola kaj grasa”, el kiu ĉiuj semidaj lingvoj (krom la etiopaj) eltiris siajn vortojn por ‘cerbo’ kaj ‘medolo’. Rimarkinde tiu signifotransformo okazis ĝuste en la mala direkto ol tiu de la latina kaj de la ĝermanaj lingvoj, kie la vorto por ‘kapo, kranio’ ricevis la signifon “cerbo, encefalo”.

4. La hindeŭropaj lingvoj kiuj, por esprimi la tri konceptojn ‘cerbo’, ‘medolo’ kaj ‘mjelo’, uzas vorton el la sama radikoj **mesgh-* kiel la rusa *mozg* estas relative multaj kaj apartenas al la orientaj branĉoj de la hindeŭropa lingvofamilio, ekz. la lingvoj sanskrita (*majjā*), avesta (*mazga-*), mezpersa (*mazg*), novpersa (*maĝz*), paŝtua (*māĝza*), panĵaba (*miñjh*) ktp.²⁰. Tiu fenomeno trovas ian klarigon en la konstato, ke pluraj najbaraj aŭ relative proksimaj lingvoj el la dravida kaj urala lingvofamilioj havas same unu solan vorton por la tri konceptoj, ekzemple²¹:

Dravidaj		Uralaj	
tamila	<i>mūlai</i>	hungara	<i>velő</i>
talajalama	<i>mūla</i>	zirjena	<i>vem, vim</i>
kanara	<i>midul</i>	votjaka	<i>vijim, vim</i>
gondia	<i>maddur</i>	mordvena	<i>uj</i>

Povas esti, ke la baza ideo pri moleco kaj graseco, kiu enestas en la semidaj vortoj pli supre menciitaj (el la radikoj *Mĥĥ*), enestis origine ankaŭ en la radikoj hindeŭropa **mesgh-*, dravida **medul* kaj urala **vedul*²². Laŭ *Trübners Deutsches Wörterbuch* (1943:556-557) la *-r-* de la ĝermana varianto de la radikoj **mesgh-* (vd. germane *Mark*, jide *markh*, norene *mergr*, svede *märg*, angle *marrow* “medolo”) rezultas el konverĝo kun radikoj, kiu vivas en la latina keltdevena vorto *marga* (vulgarlatine *margila*, malnovfrance *marle*, france *marne*, germane *Mergel*, svede *märgel*, ruse *mergel* “marno, kalka kaj argila termiksaĵo”). Jen denove vorto, kies baza ideo ŝajnas esti

¹⁵ Vd. Gordon 1965:432.

¹⁶ Vd. Levenston - Sivan 1967:371.

¹⁷ Vd. Brockelmann 1928:379; Payne Smith 1903:257..

¹⁸ Vd. Drower-Macuch 1963:260.

¹⁹ Vd. von Soden 1967:667-668.

²⁰ Vd. Mayhofer 1963:549-550; Steingass s.d., p. 1281.

²¹ Vd. Burrow 1964:351.

²² Vd. samlibre, samloke.

‘grasaĵo, molaĵo’. Aliflanke ankaŭ la vorto *medolo*, deveninta de la latina *medulla*, retroiras al vorto signifinta ‘grasaĵo’: **(s)merulla*²³, de **smer* “graso”, kp. malnovirlande *smi(u)r* “medolo”, germane *Schmer* “graso”, svede *smör* “butero”, *smörjelse* “sanktoleado”, greke *múron* “ungvento, medikamenta ŝmiraĵo”²⁴. La -d- de *medulla* verŝajne ekestis ankaŭ pro analogio kun *medius* “meza, interna”.

5. Oni povas do konkludi, ke en multaj lingvoj de Orienteŭropo kaj de relative najbaraj regionoj de Azio ekzistas vorto, rekte aŭ malrekte ligita kun la ideo de graseco, kiu signifas baze “medolon” kaj aplikiĝas ankaŭ al la koncepto ‘cerbo, encefalo’. En tiu vaste reprezentata semantika sistemo la cerbo estas rigardata kiel la medolo de la kapo. En neniuj lingvoj, male, la medolo kaj la mjelo esta rigardataj kiel respektive la cerbo de la ostoj kaj la cerbo de la spino. Se tio okazis, sed nur ŝajne, en la frua Esperanto²⁵, tio dependas de la fakto, ke Zamenhof, sub la influo de la rusa kaj de la jida semantikaj modeloj (respektive *mozg* kaj *markh*) kaj malrekte de la hebrea modelo (*moaḥ*), atribuis al la latindevena radikoj *cerb-* signifon al ĝi tute fremdan.

Tio estas unu el la ekzemploj de la influo, kiun la konceptara sistemo de la rusa, al kiu ofte konformiĝis tiu de la jida, postlasis en Esperanto. Tiu influo, jam studita de I. Szerdahelyi²⁶ kaj de D.L. Gold²⁷, meritas pluan atenton kaj esploron. En la kazo de *cerbo*, la translokiĝo de la movada gravitocentro en okcidentan Eŭropon komence de la 20-a jarcento havis la pozitivan efikon, rehavigi al ĝi ĝian originan signifon, respondantan al la semantika sistemo de la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj, kaj stimuli la enkondukon de la novaj vortoj *medolo* kaj *mjelo*. La kreo de tiuj vortoj ja estus senbezona, se Zamenhof anstataŭ *cerb-* estus elektinta radikojn kiel *mozg-*.

Bibliografio

- A Magyar Nyelv Történeti-Etimológiai Szótára*. 1967. Budapest
 Battisti, C. – Alessio, G. (1968): *Dizionario Etimologico Italiano*. vol. II. Firenze
 Brockelmann, K. (1928): *Lexicon Syriacum*. Halle
 Burrow, T. (1943-1946): The body in Dravidian and Uralian. In: *Bulletin of the School of Oriental and African Studies* 11: 328-356.
 Drower, E.S. (1963): *A Mandaic dictionary*. Oxford
 Ernout, A. – Meillet, A. (1959): *Dictionnaire étymologique de la langue latine. Histoire des mots*. Paris
 Fineman, H. (1966) *Plena esperanto-juda vortaro kaj plena juda-esperanto vortaro*. Montreal, Canada
 Gold, D.L. (1980): Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. En: I. Szerdahelyi (red.): *Miscellanea Interlinguistica*. Budapest. 300-367.
 Gordon, C.H. (1965): *Ugaritic Textbook*. Roma
 Holzhaus, A. (1969): *Doktoro kaj lingvo Esperanto*. Helsinki

²³ Kp. la formojn *mirolla*, *merulla*, *merolla* de la italaj dialektoj de la regionoj Emilio, Markio, suda Toskanio, partoj de Sicilio kaj aliloke.

²⁴ Vd. Walde 1954:58-59.

²⁵ Vd. *Nova PIV*. 2002:189, *cerbo* (3) «mia patro havas en la ostoj cerbon de leono».

²⁶ Vd. Szerdahelyi 1976.

²⁷ Vd. Gold 1980.

- Jastrow, M. (1926): *A dictionary of the Targumim, the Talmud Babli and Yerushalmi, and the Midrashic literature*. New York – Berlin
- Levenston, E.A. – Sivan, R. (1967): *The Megiddo Modern Dictionary Hebrew–English*. Tel Aviv
- Mayrhofer, M. (1963): *Kurzgefasstes etymologisches Wörterbuch des Altindischen*. Heidelberg
- Meisels, W. (1964): *Dizionario pratico italiano–polacco*. Varsavia
- Meisels, W. (1970): *Dizionario pratico polacco–italiano*, Varsavia
- von Miklosich, F. (1885): *Dictionnaire abrégé de six langues slaves: russe, vieux-slave, bulgare, serbe, tchèque, et polonais*. Amsterdam – St. Pétersbourg – Vienne
- Onatskyj, E. (1941): *Vocabolario ucraino–italiano*. Roma
- Payne Smith, J., *A compendious Syriac dictionary*, Oxford 1903.
- NPIV. La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. 2002. Paris
- von Soden, W. (1967): *Akkadisches Handwörterbuch*. Wiesbaden
- Steingass, F. (s.d.): *A compendious Persian–English dictionary*. London
- Szerdahelyi I. (1976): La semantika modelo de Esperanto. En: *Internacia Lingvistika Simpozio, Kumrovec 1975*. Zagreb. 85-148.
- Traini, R. (1966-1969-1973): *Vocabolario arabo–italiano*. 3 vol. Roma
- Trübners Deutsches Wörterbuch*. Band 1-4, 1939-1943. Berlin – Leipzig
- Walde, A. (1954): *Lateinisches etymologisches Wörterbuch*. Heidelberg
- Zamenhof, L.L. (1929): *Originala Verkaro*. Kolektis kaj ordigis: J. Dietterle. Leipzig
- Zamenhof, L.L. (1962): *Lingvaj Respondoj, Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto*. Editoris: G. Waringhien. 6-a eld. Marmande

Fabrizio A. PENNACCHIETTI (nask. 1938) doktoriĝis en 1963 per disertacio pri semida lingvistiko. En 1969 li ricevis instru-oficon pri Semida Filologio ĉe la universitatoj de Torino kaj Venecio. De 1969 ĝis 1974 li deĵoris kiel ĝenerala sekretario de la Iraka-Itala Instituto pri Arkeologio en Bagdado. En 1979 li estis vokita kiel orda profesoro pri semida filologio al la universitato de Torino. Tie li gvidis ankaŭ oficialajn kursojn pri interlingvistiko kaj esperantologio. Li estas prezidanto de la IACS (Internacia Asocio pri Kompara Semidistiko), membro de Akademio Comenius, fonda membro de AIS, ties multjara senatano kaj ekde 2008 prezidanto.

* * *

Mi sentas min tre dankema al Prof. Szerdahelyi kaj flegas lian memoron ne nur pro lia de mi priĝuita rara humaneco kaj inteligenteca brilo, sed aparte pro tio ke li afable invitis min por la interlingvistika konferenco en Budapeŝto en 1976) kaj verki artikolon por la *Esperantologiaj Kajeroj 1* pri *La prepozicia sistemo de Esperanto*). Tiu artikolo estis sekvata de pluraj aliaj kaj ties lasta plej matura frukto konsistas en la doktora disertacio (PhD) de Federico Gobbo: *Adpositional Grammar. A multilingual grammar formalism for natural language processing* (ĉe la Informadika kaj Komunikada Katedro de la Universitato de Insubria, Varese 2008).